

# **Tri paŝoj al mia bitlibro**

## Enhavo

Enkonduko  
Kion ni bezonas?  
La unua paŝo  
La dua paŝo  
La tria paŝo

## Enkonduko

Multaj homoj pensas, ke 'veraj' libroj devas esti faritaj el papero. Tamen oni ne devas neglekti la avantaĝojn de bitlibroj. Krome mi mem spertis, ke la farado de propra elektronika libro estas tre ĝojiga afero. En la reto troviĝas multaj diversaj enkondukoj pri tiu temo, eĉ filmoj, kiuj klarigas la aferon. Ĉi tie mi nur traktas unu metodon ne asertante, ke tiu estas la plej bona. Krome mi priskribos nur simpligitan vojon.

## Kion ni bezonas?

Mi uzas la liberan programon **Calibre** por produkti bitlibron en '**epub**'-formato. Tio funkcias sur mia komputilo sub Ubuntu 14.04. La tekstojn mi skribas per **LibreOffice**. Per **Gimp** mi adaptigas la bildojn. Mia elektronika legilo estas **PocketBook Touchlook 3**. Oni povas testi la bitlibron ankaŭ sen tiu ilo sur la komputilo.

## La unua paŝo

Per LibreOffice ni skribas la tekston kiel kutime. Ĉiu ĉapitro ricevas titolon, kiun ni markas kiel superskribon ekz. por ebena 1 aŭ 2. Tiuj titoloj poste aperas en la enhavtabelo. La tutan tekston ni savas kiel 'odt-dokumenton' (ekz.: mia-libro.odt)

## La dua paŝo

Por krei taŭgan titolbilon, ni denove skribas paĝon per LibreOffice. Tiu paĝo ne havu margeton. Ni skribas bone legeblan titolon kaj enmetas plaĉan bildon. La bildon ni antaŭe adaptigas per Gimp. Poste ni savas tiun paĝon kaj vidigas ĝin sur la ekrano. Atentu! La kursoron ni antaŭe puŝas al la plej lasta linio, aŭ pli bone al nova malplena paĝo. Per klako sur la presado-klavo ni savas la paĝon kiel bildon. Tiun bildon ni formtranĉas per Gimp kaj eksportas ĝin (ekz.: mia-titolbildo.png).

## La tria paŝo

Nun estas tempo por Calibre. Ni elektas la opcion por aldoni libron kaj elektas la dosieron 'mia-libro.odt'. Calibre nun importas tiun dosieron kaj ni konvertas ĝin. Ni elektas la formaton 'epub' kiel celon. Oni enmetu la datojn por la titolo, la aŭtoro. Se Calibre ne ricevas ordonon por ŝanĝi la titolbilon, ĝi mem produktas iun, kiu verŝajne ne plaĉas al ni. Tial ni instalas nian bildon 'mia.titolbildo.png'. Por instali la enhavtabelon, ni klaku sur la tiurilatan opcion kaj elektu la ĝustan filtrilon (ekz. //h2, se antaŭe la titolo de la ĉapitroj estis tiele markitaj).

Mankas eventuale nur malmultaj ŝanĝiĝoj. Ĉe aranĝo 'Layout' ni prenu la opcion 'Forigi la distancon inter la paraĝrafoj'. Per tiu lasta agordaĵo ni finpreparis nian bitlibron.

Gratulon! Bonan legadon!

*Klaus Friese, Hamburgo 2018*